

# LA SKOLTA MONDO

NE ISSN 0037-6558

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

Numero 6 Volumo 7 Dua Jarkvarono 1989

En multaj naciaj programoj pri skoltado ekzistas programoj rilate al Naturprotektado. Ili ebligas al la geskoltoj krei proprajn projektojn pri naturprotektado de ilia ĉirkaŭaĵo: purigado de riveroj, parkoj k. placoj, k.t.p. La geskoltoj laŭ siaj propraj eblecoj plenumas la planojn kaj programojn. Tiel oni faras, ke ili komprenu la mondajn problemojn kiel polucio k. precipe tiuj problemoj en siaj propraj urboj.
Bedaŭrinde ni ne povas malaperigi la polucion el la tero, ĉar ĝi estas ja granda kaj grava; sed, male, ni povas kune igi la mondon konscia pri la problemo kaj serĉi la rimedojn por mildigi la rezultatojn kaj forigi la kaŭzojn.
Nia mondo lamas, kaj nia devo estas helpi ĝin ne plu lami; ĉar multaj estontaj gejunuloj ne plu havos tion kion ni nun havas, malbone sed ankoraŭ havas. Eble ili ne vidos tion, pro nia kulpo.
Du ŝipegoj subakviĝis proksime de la Antarktiko kaj la oleo falis en la maron. Unu semajno poste, en Alasko ion simila okazis. Grandegaj domaĝoj, oleo ĉie, kaj bestoj kaj bestetoj mortis, post longa aŭ mallonga suferado. Ĉu ili petis tion? Ĉu ili meritis tion? Certe ne, sed tie ĝi estas. Homaj neglektoj kaŭzis ke la ŝipoj ne atingus la celon devigan, sed kaŭzis nedevigan celon.
Pripensu! Ĉu nia Kreinto donis al ni Naturon por tio? Ĉu ni havas rajton por kaŭzi tion? Faru vian eblon, ĉar ni havas voĉon kaj devon plibonigi nian mondon.

## LA VULPO

La Vulpo estas ludo de granda akceptado inter la geskoltoj ĉie kie ni iam ludis ĝin.


Tio ĉi devigas precipe al ĝia simpleco kaj pro la granda intereso, kiun ĝi kreas je la fino de la ludo pro ĝia malfacileco.

Oni povas ludi ĉie, sed zorgu ke la tereno ne estu tro danĝera aŭ dekliva.

La ludantoj, escepte de unu el ili, troviĝas malantaŭ unu el la du cel-strekoj. Ili devas pendi la lud-bendo en la talio.

La lud-gvidanto donas signalon kaj la ludantoj devas klopodi atingi la cel-strekon sen esti kaptita de tiu ludanto, t.e. la vulpo, kiu povas libere trakuri la terenon; sed li ne rajtas trapasi la cel-strekojn. Por kapti, la vulpo devas preni la lud-bendojn. La ludantoj kaptitaj fariĝas ankaŭ vulpoj kaj devas meti la lud-bendon ĉirkaŭ la kolon aŭ la brakon por ke oni ne provoku erarojn.

Pro tio, ke dum la ludado, la nombro da vulpoj kreskas; do, fariĝas multe pli malfacile atingi la cel-strekojn.




Por ke la intereso ne malgrandiĝus, oni devas interkonsenti pri la tempo-daŭron, kiun la ludantoj rajtas resti malantaŭ la cel-strekon. Ankaŭ oni devas eviti ke la ludantoj kiuj ĉe la fino restas, interkonsentu pri la estonta lupo, ĉar tiu ĉi decido preskaŭ ĉiam ripozas sur la malplej bona fizika persono de la grupo.

La vulpo por la venonta ludo estos precize tiu, kiu estis la lasta kaptita far de la vulparo.

Rimarko: Kiam oni eliras el la cel-streko, estas devige atingi la alian. Estas ja malpermesite reveni al tiu cel-streko jus forlasita, sen trapasi la alian strekon.

**Sendu skoltgazetojn tutmondajn**

## SKOLTISMO, EDUKA JUNULARA ORGANIZO (3)

Nia movado permesas al la junularo malkovri sin, trovi sin mem. Ĝi donas "vivĝojo"n, kamaradecon kaj memfidon. Tiuj ĉi donitaĵoj permesas ke la junul(in)o malkovru sian alvokiĝon, personan vivsistemon kaj estontan profesion aŭ metion sub la bazo de fortaj psikologiaj kaj sociaj premisoj.

La kunvivado en malgrandaj grupoj eltiras de la junul(in)o sian infanan egoismon, kaj ĵetas ŝin/lin entuziasme je la konkerado de sia persona perspektivo, kiu samtempe enkondukos lin en la lernado de altruismo kaj de la Universala Frateco.


Ĉi tiu amikeca kunvivado, plenplenas ĉiajn skoltajn travivaĵojn.

Oni kunvivas dum preskaŭ ĉiun skoltan aktivecon: sub la ĉielo, en la montaro, fiŝkaptante. Tiaj agadoj plenumas la tutan programaron en la skolta edukado.

Pere de ĉi tiuj agoj, je libera aero, la kunvivado estas tiel forta kaj eduka, ke li-ŝi devas tuj konsciigi lin-ŝin pri siaj eblecoj, kaj el ili klopodi plenumi sian propran personecon.

La skolt(in)o lernas tiel spontaneecon, imagecon, kreativecon, mensan facilmovecon, memoron, atenton, observadon, movkapablecon, socieblecon, hobiojn, solidarecon, teknikojn, gvidkapablecon, altruismon, venk-deziron; li-ŝi unuvorte estas iu.

Skoltismo edukas per la varma kunvivado la junul(in)on, sed tra la junul(in)o mem. Tial, skolta edukado estas samtempe edukado socia kaj persona.



# GUIAS Y SCOUTS DE CHILE

La 21an de Majo estas grava dato por la ĉiliaj geskoltoj. Tiam oni festas -ĉie tra la tuta lando- la datrevenon de la fondiĝo de Geskolta Asocio de Ĉilio. Kaj ĉi-jare la festado estas ja multe pli grava, ĉar ĝi fariĝas 80 jara!

En 1909, vizitis Ĉilion Baden Powell; verŝajne li vizitis la lando pro ia militista misio. Kelkaj interesatoj petis al li prelegi pri lia skolta movado. La prelego okazis ĉe la Ĉilia Universitato en Santiago, la ĉefurbo, kaj vekis interesegon inter la geaŭskultantaro. Baŭdaŭ aperis la unua skolta grupo ĉe la Nacia Instituto sub la gvidado de S-ro Alcibíades Vicencio, kaj jam la 21an de majo samjare oni fondis la Asocion.

Tiel, la Skolta Movado fariĝis "internacia", ĉar Ĉilio estis la unua lando ekster Britio, kiu havis Skoltan Asocion. La Asocio mem fariĝis la unua en la tuta Amerika Kontinento.

La ĉilia asocio estis unu el la unuaj landaj asocioj en la mondo, kiu komencis labori por la unuiĝo de la skolta kaj skoltina movadoj. Post longaj klopodoj, nur en 1974 komencis efektiviĝi la revo. Komitato kunvenis la Geskolta Katolika Federacion, la Skolta Asocio de Ĉilio kaj Skoltina Asocio de Ĉilio. Statute ili kunigis en Geskolta Asocio de Ĉilio nur en 1978.


En la Asocio jam partoprenas ĉ. 50 000 gejunulojn kaj tiel ĝi fariĝis la plej granda junulara organizo de la lando.


Gratulon al Vi!




LA SKOLTA MONDO, N-ro 6, Volumo 7, Dua Jarkvarono 1989.
PREZIDANTO: Franco Abriani, Via Falconetto 24, 37131 Verona, Italio.
Gen. SEKRETARIO: David H. Withey, 21 Brookfield Ave., Waterloo, Liverpool L22 3YE, UK.
KASISTO: Lawrence Mee, 19 Cranbury Rd., Eastleigh, Hants., SO5 5HB, U.K.
REDAKTORO: Héctor Campos Grez POK 231, Curicó, Cilio

KOLTUKA UZADO






## LA FABELO DE SUNFLORO

Tradukis Irja Klemona
Finnlando

En bruna saketo kuŝis aro da semoj, grandaj kaj malgrandaj, rondaj kaj plataj, glataj kaj malglataj, ĉiuj miksite. Malfrue en aŭtuno Matti kolektis ilin el la florbedo de Panjo. Semoj atendis kaj esperis ion, sed kion neniu de ili povis esprimi. En ĉiuj semo dormis kaŝita florvivo atendante la momenton kiam ĝi povus vekiĝi, sed pri tio la semoj ne sciis, kaj neniu rakontis kaj klarigis.

En la tablokesto, kie Matti havis siajn semojn, li havis ankaŭ aliajn trezorojn atendante printempon kaj someron. Tie kuŝis fiŝhokoj kaj flosajoj, paro da rustaj ŝraŭboj, najloj kaj ŝraŭbingoj, brula lenso kaj mortinta papilio.

La papilio atendis kaj esperis nenion kaj estis tute silenta. Ĝi kuŝis en malgranda papera kesto siaj belaj, velormolaj flugiloj etenditaj. Gi estis kaptita ĝuste, kiam ĝi balanciĝis sur bonodoranta floro kaj pensis, ke neniu en la tuta mondo povas esti pli feliĉa ol la papilio.



La fiŝhokoj kaj florilo j atendis someron kaj ĉiam parolis. Ili babilis nur pri la fiŝkaptado kaj pri terure grandaj fiŝoj, kiujn ili iam vidis kaj kaptis.


La ŝraŭbnajloj kaj la ŝraubingoj babilis nur pri maŝinoj, oleoj, mateloj kaj ŝraŭbŝlosiloj.

– Tion mi diras, ke kelkaj ŝraŭbŝlosiloj povas esti ŝokaj, diris multfoje dum la tago mizere kunpremigita ŝraŭbingo. Kaj la ŝraŭbnajloj pensis aspekti kompatemaj, kvankam ili ne sciis, kia la ŝraŭbŝlosilo estas.

La bruliga lenso atendis sunon kaj printempon. Gi ne babilis, ĝi estis fiera kaj malŝatis la kunularon kun kiuj ĝi hazarde devis esti. Ĝi aŭskultis kaj meditis kaj kelkfoje murmuretadis kaj estis kolera je la rakontoj de la kamaradoj.

Sed en unu afero ĉiuj loĝantoj de la tablokesto samopiniis. Eĉ la bruliga lenso ne murmuretis, kiam la plej malgranda fiŝhoko laŭ sia maniero ĝemis:

– Ho ve, terure, kiel longa kaj teda la tempo povas esti!




Dum la vintro Matti tute ne memoris siajn tresorojn. Li havis multege da taskoj. Li veturigis per sia sleteto hejten lignon el la stokejo al la stuparo de la kuirejo kaj portis ilin internen. Li forjetis negon post neĝa blovado per sia ligna fosilo de la korta vojeto kaj laboris en la arbaro kun la viroj. Ĉiutage li havis permeson porti avenon al la eta ĉevalido. Kompreneble li multege skiis kaj glitkuris kaj veturis per sia sledeto. Laŭ lia opinio la tempo tute ne estis longa kaj enua.

Kiam la vintro forpasis kaj la printempa suno degelis la neĝon kaj la glacion, Matti memoris siajn trezorojn. Tute unue li serĉis la bruligan lenson kaj la papilion. Ĉiun sunan tagon li portis la papilion al fenestro en la plej varman sunbrilon kaj bruligis sub la fenestro per la lenso maldikan paperon kaj splitojn.

– Kiel lerta kaj mirinda mi estas, pensis la bruliga lenso. – Mi ververe estas io tute alia ol la fiŝhokoj kaj la mortinta papilio kaj la semoj en la papersaketo. Nenio ili estas!

Poste venis tre varmaj tagoj. La saliko floris. La alaŭdo kantis. Kaj kiam Matti portis sian mortintan papilion al la plej varma sunbrilo okazis miraklo. La papilio reviviĝis. Ĝiaj flugiloj moviĝis unue malmulte poste multe supren kaj kunen kaj ree malsupren etendite. Matti ekkriis je plezurp kaj prenis ĝin sur sian manon kaj subite ĝi ŝvebis for tra la malfermita fenestro.

– Neniu povas esti pli feliĉa ol la papilio, ĝi pensis ŝvebante per siaj belaj velormolaj flugiloj en la printempa aero plena da sunbrilo kaj odoroj de burĝonoj. – La bruliga penso kaj la najloj kaj la fiŝhokoj ne povas imagi kiel ĉarme estas vekiĝi de la vintra dormo en la printempan sunbrilon.



(Daŭrigota)

A. Sekretario: Ĉar mi fakte nur surprenis la taskon de komenco de junio pasintjare, mia raporto nur kovras la duan duonon de 1988.

Mia unua tasko estas lerni pri la taskoj ligitaj al la sekretaria posteno, kaj ankoraŭ faras tion. Do ĝis nun mi ne povas raporti multon pri pozitivaj rezultoj.

Estas klara ke inter la nomoj kiuj aperas sur la listo de respondeculoj, multaj nelonge validas. Mi penadas ricevi iu ajn vivsignon el ili. Tiel nun mi alfrontas la taskon eltrovi agemajn persojn kiuj estas pretaj agi por SEL, kaj kiuj persisteme klopodos gajni anojn por la Ligo.

Unua iniciativo kiun mi penadas starigi, estas starigi kunlaborado kun aliaj Esperanto-organizajoj kiel ekz-e TEJO. Ankaŭ ni devus fari pliajn kontaktojn kun la Landaj Asocioj.

La ŝanĝoj kiuj nuntempe okazas en la politikaj sintenoj de la Socialismaj Landoj donus al ni la eblecon pri plua disvastigado inter tieaj renovigitaj skolt-asocioj.

Pri la SEL-kunveno kadre de la Brajtona UK, bonvo lu kontakti min. Sciigu vian nomon kaj kongresnumero kaj la temo estos " La Renovigo de la Ligo". D.H.W.

B. Kasisto: La ciferoj, sur kiuj tiu ĉi raporto bazi ĝas, estas donitaj en la Spezokonto por la jaro 198 kaj Bilanco por la lasta tago de la jaro, kiuj ambaŭ estas disponeblaj al la membro de la Ligo post peto al la kasisto (enmetu 1 irk.).

La eltare evidenta rezulto estas malgajno en la s mo de 871 pundoj, kvankam sufiĉe multe da mono resta en la Asocia Kapitalo por ebligi la elpagon de tiu m gajno.

Preskaŭ ne eblas fari komparojn kun la rezultoj p pli fruaj jaroj, ĉar precize kompareblaj ciferoj ma kas por tiuj pli furaj jaroj. Aparte notinde, tiuri te, estas, ke la eroj por estraraj elspezoj kaj ali administraj kostoj enhavas elspezojn, kiuj rilatas a la lastaj sep jaroj en Italio; simile, la sumo de m bro-kotizoj enhavas enspezojn el Italio dum simila p riodo.

Menciinde estas, ke la sumo de donacoj kaj subve cioj enhavas, krom la kutiman subvencion el la Leah Fondaĵo, en Britio, donacojn de S-roj Bakker kaj Wo

Eble la sole ebla komparo kun pli fruaj jaroj estas tio pri la kostoj de la organo de la Ligo, La Skolta Mondo, sed tio montras, ke la plialtiĝo estas nur dekono kompare kun la meza kosto por la pli-fruaj kvar jaroj, kaj do tute modesta plialtiĝo.

La diversaj ciferoj de la Bilanco montras, ke la bonhavo de la Ligo estas tute sekure deponita, grandparte en poŝtĉekinstancoj en Nederlando kaj Britio. Klarigo por la relative granda kredita cifero sub Pasivo, ligita kun Personaj Kontoj, estas, ke je la jarfino du grandaj sumoj estis survoje el la kaso; frue post la jarfino, ambaŭ sumoj estis pagitaj.

Prenante larĝan superrigardon estas evidente, ke la financa bazo de la Ligo estas tre solida. Necesas ĉiam certigi, ke tiu mono, kiun trasdonis aŭ heredis al ni niaj antaŭaj gekolegoj, efike laboras por la bono de nia Ligo, por la Esperanto-Movado kaj por la homaro ĝenerale. L.M.

C. Redaktoro: Dum la jaro 1988, regule aperis la oficialan bultenon. Artikoloj venis el Nov-Zelando, Hispanio, Finnlando, DR Germanio, Japanio, Usono, Nederlando kaj Britio.

Kelkaj malfacilaĝoj rilate al la presado pro la nesperto de la Redaktoro. Generale estis kontentiga en ĝia aspekto kaj enhavo. La rapida enpaĝiĝo, enpoŝtigo, kaj pakaĵigo de la Bultenoj devigas precipe al la helpemo de la Skolta Grupo "La Concepción", el Curicó, Ĉilio; mi vere dankas ilin pro tio.

D. La Prezidanto: En LSM ni povis vidi grandan kaj gravan skizon de nia agado per Esperanto. Ĝi fakte estas la koro de nia Ligo, kaj ĝi permesas kontakti ĉiun vi. Esta grave plimultigi la nombroj de SELanoj aŭ fervoraj estimuloj de SEL. La bulteno ne sufiĉas, ankaŭ lernolibron kaj terminaron. Skoltismo estas multe pli.

Oni devas pensi pri la ebleco varbi plajadon de "artistoj", kiuj pasie tradukos interesajn kaj allogajn naciajn librojn , aŭ simplajn artikolojn, aŭ - des pli bone- verku ili mem propran skoltan literaturon.

Nia ligo vivas kaj estas tempo por "ĵeti la ŝtonon" kaj pli verki rilate al skoltismo.

Nia ligo necesas kaj urĝas renovigi sin. Ni planos nian renovigon kun via helpo. Ni bezonas vin!

## 8th world scout collectors meeting Verona 28-30.7.89

8-a MONDA RENKONTIGO DE SKOLTOJ-KOLEKTANTOJ Verona 28-30.07.89

Gi estas organizata de la Itala Sekcio el International Badgers Club kaj de la Associazione Italiana di Scoutfilatelia kune kun la Sekcio CNGEI el urbo Verona. Tie inter la 28 kaj 30 de julio de 1989 okazos la 8-a Monda Renkontiĝo. Partoprenos geskoltoj kaj eks-geeskoltoj el multaj landoj pri diversaj temoj ĉiam rilatantaj al skoltismo. Informoj petu el la organizanto (angle, france aú itale) Carlo Veronese, Via Torricelle 3, 37128 Verona, Italio.




Ni ricevis belegan flugfolion el la Geskolta Asocio de Aústrio. Pere de tiu ĉi broŝureto oni informas al ni de la Internacia Geskolta Renkontiĝo Vienna '90 (Vieno'90). Gi okazos la 28 de julio ĝis la 10 de Aúgusto 1990 en Laxenburg, proksime de Vieno. Sajnas ke ĝi estas belega loko, kaj ili invitas partopreni ankaú al SEL-anoj. Informoj (germane, angle, france) ĉe Wiener Pfadfinder und Pfadfinderinnen, VIENNA 90, Hasnerstrasse 41, A-1160 Wien (Vieno), Austrio.



## VOLAS KORESPONDI

SKOLTA GRUPO "VERDA STELO", deziras ricevi E-librojn, lernolibrojn kaj E-literaturon. Skoltoj el tiu grupo lernas Esperanton kaj deziras perfektigi la ligvokonon, korespondi kaj praktiki Esperanton. Kontakadreso: Alejandro Mery (Skoltestro), Skolta Grupo Verda Stelo, Correo Viña del Mar, 5a Región, Chilio, Sudameriko. Antaúdankon!

Orsolya (Ursula) EICH, Thälmann u. 26/g. II em 227, H-1131 Budapest, Hungario; 20-jara infanvartistino deziras korespondi tutmonde.

Lopuŝný Zdeno, Moŝnov 165, Príbor 3, CS-742 51, Ceĥoslovakio. Li deziras interŝanĝi bildkartojn kaj suvenirojn; li estas 24-jara kaj interesiĝas pri historio, muziko, psikologio.

## NI DANKE RICEVIS:



ABC EN LA INTERNACIA LINGVO E-o
El Popola Ĉinio
Jornal da LBV (E-a Eldono)
ILERA-BULTENO
Pacifika Rondo de ILERA
Esperienze e Progetti
Kontakto
Pionniers (Francio)
Scouts (Francio)
Novajoj Tamtamas
Rio Esperantista
Louveteaux (Francio)
Forumo
Scouting in Wellington.

## Leteroj

S-ro Sven Möllestad el Svedio, deziras ricevi malnovajn gazetojn kun skolta enhavo. Tiuj, kiuj povas helpi lin, skribu al li sub la jena adreso: Kullagatan 37, S-252 20 Helsingborg, Svedio.

*

Ni ricevis flugfolion pri la Esperanto-Kursoj ĉe San Francisco State Unkversity. Okazos Baza, Meza kaj Perfektiga Kursoj, kaj iu libera kurso pri la Cseh-Metodo. La kursoj estos la 3an ĝis la 21an de Julio, 1989. Informoj: Cathy Schulze, Administranto, Esperanto-Kursoj, 410 Darrell Rd.; Hillsborough, CA 94010. Telefono 9(415)342-1796, Usono.

*

S-ro Henri W. Appel el Sudafriko skribis al ni. Pri la raporto rilate al la 6a Ĵamboreo Tutamerika kaj al la frazo "...preskaú neniu sciis pri E-o..." Li diras ke se ni agas nur inter ni, la situacio restos tia. "Eble ni povos veki konscion pri la ekzistado de kaj intereson por nia lingvo se SELanoj skribas al diversaj skoltaj gazetoj, petante plumamikojn por korespondi Esperante. Tiel la nomo de nia lingvo iom post iom penetros la tutmondan skoltaron". Do, EK!

S-ro J. K. Hammer informis al ni, ke ankoraú ekzistas pluraj ekzempleroj de VASTAJ HORIZONTOJ ĉe li, en la franca, nederlanda, kataluna kaj hispana lingvoj. Restas kelkaj en la germana kaj norvega lingvoj kaj bedaúrinde la anglaj jam elĉerpiĝis. Se vi deziras ricevi ĝin/ilin skribu al J. K. HAMMER, Taxusstraat 7, NL-1505 AA Zaandam, Nederlando. Kaptu la okazon havigi al vi taúgan varbilon kaj informilon!

ARAM TSAM TSAM

./. Aram tsam tsam - aram tsam tsam - guli
guli guli guli - guli - aram tsam tsam ./.

./. Arabit, arabit, guli guli guli guli
guli aram tsam tsam./.




Se vi deziras kunlabori en la redaktado de la revuo, turni sin al la redaktoro. Antaùdankon pro tio!